

& Anima trankvileco:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per sudinsulaj melodio kaj rekantaĵo de Jalgrima balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/La Tiidodo Ti LaMi La Tido TiLa; dolre miimimi fa mimi reldo mimi miLa;

(#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 /Ŝuista lernanto dumnokte frapetas ;
A2l pordo de l' majstro-edzi2no kaj
petas:

(×: **Tondru danco tre ĉarme ; Nun
tretu fiere ĉiuj en la ĉen' ; Staras jen
mastrino.**)

'2 "Majstrino, bonvolu la ĝenon
pardoni! ; Ĉu volas glaseton da akvo vi
doni?"

'3 La bubo ja loĝas ĉe sia sinjor', ; Ne
iras vespere por dormi li for,

'4 Kaj jen la estrino la akvon konsentas.
; La bubo sed novan deziron prezentas:
.....

'5 "Majstrino, bonvole pardonu!
Pardonu! ; Mi petas, anstataŭ glaseton
vi donu

'6 Ja poton plenplenan de akvo al mi!" ;
Kaj ankaŭ ĉi tion konsentas do ŝi.

'7 "Mi petas, mi petas, sitelon vi prenu,
; Bonvole duone plenigi ĝin penu!"

'8 "Nu bone! Mi ankaŭ sitelon ja
prenas, ; Se tio pli bone al vi nun
konvenas." -

'9 "Ho tre estimata vi majstro-edzin', ;
Bonvolu plenigi tutege nun ĝin!"

'10 "Ho bubo! Ĉu havas vi akvo-
manion? ; Cetere konsentas mi ankaŭ ĉi
tion:

'11 Sitelon plenplenan de akvo mi
donas, ; Sed diru, por kio vi akvon
bezonas?"

'12 Kaj diras la bubo post longa hezit': ;
"En mia ĉambreto ja brulas la lit'!"